

# la Espero

1989:4

SVENSKA

ESPERANTOTIDNINGEN

---

Brighton:  
Enhavoriĉa  
kaj ĝuinda  
74-a Universala  
Kongreso de  
Esperanto

---

## Redaktoro:

Mi redaktos *La Esperon* ekde tiu ĉi numero. Ni naskiĝis en 1960. Profesie mi estas pastro, sed ĝis aŭgusto 1990 mi havos libertempon por prizorgi mian novnaskitan knabon Nils.

Mi ne enkondukos iajn "novaĵojn" en la revuo, sed laboros kiel miaj antaŭuloj. En tiu ĉi numero tamen aperas pli-malpli kompleta librolisto de Eldona Societo. Fakuloj pri librovendado diras ke septembro kaj decembro estas la tempo, kiam plej multaj libroj vendiĝas. Bonvolu skribi al mi pri io ajn.

Leif Nordenstorm

## Deziras korespondi

- 42-jara teknikisto kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn, ŝatas librojn kaj vojaĝojn: Edmund Giebocki, ul. XXX-lecia 2/50, PL-12-100 SZCZYTNO, Pollando.

- Du ĉeĥaj knabinoj: Jana Skopcová, Dukelská 1585, Benešov u Prahy, CS-25601, Ĉeĥoslovakio; Vladka Urbanová, Konopištská 1652, Benešov u Prahy, CS-25601, Ĉeĥoslovakio.

- Akceptas gastojn. Skribe petu antaŭe! Jirí Plášil, 7 Listopadud 221, CS-530 02 Pardubice, Ĉeĥoslovakio.

- 32-jara instruistino: Jadwiga Chmielewska, ul. Wyspianskiego 8/58, PL-25-409 Kielce, Pollando.

- Neijiang-a Esperanto-Asocio kaj ĝiaj membroj deziras korespondi pri diversaj temoj: NEA, c/o Les Lo, Neijiang Construction Bank, 641000 Neijiang, Ĉinio.

- 22-jara alĝeriano, kiu planas vojaĝon tra Eŭropo, serĉas svedajn korespondantojn: S-ro A-Hamimi Scaourar, 10, Rue de la Liberté, Guendouze 06251, (W) Bejaïa, Alĝerio.

## La Espero

### Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Redaktör: Leif Nordenstorm, Studentvägen 36, L:51, 75234 Uppsala tel. 018 - 153362

Sättning: Per Aarne Fritzson och Leif Nordenstorm

Utformning: Franko Luin

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1989

## Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl 11 - 13 och 17.30 - 19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1989: Direktansluten medlem 125 kr. Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem 50 kr.

Enbart prenumeration: 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr. Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

## SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589-155 31 (Nordiskt samarbete)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Tolsered Pl. 2265, 425 90 Hisings Kärra, tel. 031-57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)

Sekreterare: Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91 (kansliet, massmedier)

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-12205 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby, tel. 0491-20461 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Bertil Andréasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-16 26 87 (intern.org.)

Suppleant: Per Aarne Fritzson, Möregatan 9, II, 11627 Stockholm, tel. 08 - 408892

Suppleant: Leif Nordenstorm, Studentvägen 36, L:51, 75234 Uppsala tel. 018 - 153362

Informationskommittén: Bernt Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589-155 31.

## Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Öppettider: 1 september - 15 maj: onsdagar 10 - 11, torsdagar 17 - 18.

Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson.

## Enhavo

- 50 Redaktoro  
Deziras korespondi
- 51 Kaj nun ek al la aŭtuna laboro!
- 52 La 74-a Universala Kongreso de Esperanto
- 54 Infanoj kongresetis apud Brighton
- 55 Variaj prelegoj en la Kongresa Universitato  
Ankaŭ la distraĵoj tre abundis
- 56 Tago de la lernejo kaj internaciaj ekzamenoj  
SEJU: Barn och ungdomsträff i Närke i oktober
- 57 TRA LA LANDO  
Kurso por familioj  
Nästan 100 program  
Bra resultat  
Nytt namn
- 58 ESPERANTOFÖRLAGETS BOKLISTA
- 62 Donacoj
- 63 ILEI-konferenco en Kimrio  
KALENDARO
- 64 TRA LA MONDO  
Ne Esperanta, sed hungara Esperanto-disko el Sovetio  
Nekrologo: Martha Colliander

## Prezidanto:

### Kaj nun ek al la aŭtuna laboro!

Kiam vi legas tion ĉi, ni jam havas la dolĉan, liberan someron malantaŭ ni. Restas nur la memoraĵo, kiu, mi esperas, estas inda. Espereble ni akiris fortojn por nia estonta Esperantolaboro!

**Nova prezidanto de UEA**  
Malantaŭ ni estas ankaŭ la UK en Brajtono. Profesoro **John Wells**, Londono, estis elektita nova prezidanto de UEA post **Humphrey Tonkin**, kiu laŭregule ekŝiĝis post ses jaroj.

John Wells estas bonkonata kaj lerta esperantisto kaj tre taŭgas kiel prezidanto de nia monda asocio. Mi kaj la ceteraj esperantistoj en Svedio deziras sukceson kaj progreson al li. Legu pri la kongreso aliloke en la gazeto.

### La tri gravaj okupoj de esperantistoj!

Ankaŭ la Esperantotago estas malantaŭ ni – sukcesa, ĉu ne?

Guste nun la Esperantokursoj komenciĝas en la tuta Svedio. Unu el tri gravaj okupoj por esperantistoj estas: **Instrui Esperanton**. Alia estas: **Informi pri Esperanto** al ĉiuj gravaj celgrupoj – la lernejo, politikistoj, internaciaj organizoj ktp, kun argumentoj realismaj kaj korrektaj. Helpilo estas la libro "38 svar till den som undrar om Esperanto", aĉetebla ĉe Esperanto-Centro. Vi povas trovi multajn saĝajn kaj uzeblajn argumentojn en ĝi.



La tria gravaĵo estas: **Paroli Esperanton**, kiam ajn vi havas okazon. Oni ja devas ekzerci la lingvon por ne forgesi ĝin.

### Estrarkunsido

La 7-an de oktobro la estraro de SEF havos kunsidon. Dank' al la loteria mono, favora donaco de **Sven Sundin**, Växjö, kaj aliaj bonvenaj donacoj de esperantistoj, nia ekonomio estas bona ĝuste nun, kaj inter multaj aliaj punktoj dum la estrarkunsido, ni ankaŭ planas kiamaniere ni plej efike uzu tiun monon kadre de nia laborplano. Ni volonte akceptos viajn ideojn kaj sugestojn. Bonvolu sendi al mi!

### Vojaĝo al Havano en julio 1990

La Universala Kongreso de UEA ja okazos en Havano venontsomere. Jam ekestis pluraj proponoj kiel oni komune vojaĝu tien de Svedio kaj de najbaraj landoj. En la venonta numero ni prezentos tiujn proponojn.

Bonan sukceson je via aŭtuna Esperantolaboro!

Karin Lindquist

# La 74-a Universala Kongreso de Esperanto

La 74-a UEA-kongreso komenciĝis por la plej multaj kongresanoj sabatovespere la 29-an de julio per "Konatiĝa vespero". La kongresejo estis la bela Kongresa Centro de Brajtono. Trovis tien la vojon ĉ. 2200 gesamideanoj.

Kiel kutime, sekvis semajno plena de kunsidoj kaj aliaj aranĝoj. Ĉiam oni devis elekti inter du-tri, kelkfoje 8-9 diversaj. Tial mia raporto ne estos kompleta, sed nur fragmenta priskribo de tiuj aferoj, kiujn mi sukcesis ĉeesti aŭ partopreni. La aranĝoj okazis en tri diversaj lokoj kaj feliĉe la vetero dum la tuta semajno estis bela kaj sufiĉe varma. Tial la promenadoj inter la tri lokoj fariĝis agrablaj kaj utilaj (por la digesto) interrompoj al la multa sidado.

## Komitato

Jes, por la plej multaj kongresanoj la kongreso komenciĝis sabatovespere, sed por tiuj, kiuj apartenis al la komitato, ĝi komenciĝis jam en la sabata antaŭtagmezo kaj pludaŭris ankaŭ sabaton kaj dimanĉon post la kongreso. Ĉi-jare estis elektojaro, kaj tio postulis sufiĉe multe da tempo. (Ĉiu tria jaro estas elektojaro.)

## Novaj prezidanto kaj estraro

Humphrey Tonkin decidis ne re-kandidatiĝi por la prezidanteco. Anstataŭe ni havis du aliajn kandidatojn: John Wells kaj Joŝimi Umeda. Elektita estis Wells per 40 voĉoj kontraŭ 22 por Umeda kaj 2 sindetenoj.

Ĉar preskaŭ la tuta antaŭa estraro ekzistis kaj estis pluraj novaj kandidatoj, la elekto de nova estraro fariĝis sufiĉe longa kaj malfacila proceduro. La elekto de vicprezidantoj eĉ fariĝis iom batala afero. Post multe da diskutoj, disputoj kaj "amikaj konsiloj" la novaj estraranoj

elektiĝis jene: Wells prezidanto, Lins kaj Dobrzynski vicprezidantoj, Buller ĝenerala sekretario kaj cetero So, Princz, Štimec, Maertens kaj Durwael.

## Longa financa diskuto

Alia punkto, kiu kaŭzis multe da longaj diskutoj kaj eĉ kvereloj, estis la financoj, kaj la diversajn spezo-kontojn kaj la buĝetproponon oni longe kaj detale pritraktis. La propono pri altigo de la supera aĝolimo ĝis 30 jaroj por membreco en TEJO estis akceptita post sufiĉe multe da diskutado, speciale pri la konsekvencoj por UEA rilate financojn. Oni starigis specialan komisionon pri financoj kaj ankaŭ unu pri kongresoj: Cetero oni decidis atendi ĝis la nova estraro havos eblecon inter si diskuti la labormanieron kaj kiujn komisionojn ili eventuale volos starigi.

La cetera laboro konsistis el diversaj raporto de komisionoj, kiuj laboris dum la kongresaj tagoj, nomumo de honoraj membroj kaj


kompreneble diskutoj pri la jarraporto por 1988, inkluzive la redaktado de la gazeto "Esperanto". Estis sufiĉe da diskuto flanke de kaj komitatanoj kaj ordinaraj kongresanoj, antaŭ ol la malnova estraro ricevis malŝarĝon kaj la nova prezidanto povis komenci sian oficon.

## Maltro da tempo por venonta laboro

Kiel kutime, la komitato uzis tro multe da tempo por diskuti la jam faritan laboron, la buĝetajn detalojn kaj diversajn rezoluciojn. Ĉi-jare ankaŭ la diversaj elektoj forrabis multe da tempo. Pro tio preskaŭ ne restis tempo preparoli la venontajn laborplanojn. Malfaciligis ankaŭ la preskaŭ kompleta ŝanĝo de estraro, nur Gregoire Maertens restas de la antaŭa. Sed ŝajne oni elektis tre taŭgajn personojn. Ili certe faros sian plejblon por antaŭenigi Esperanton. Sed laŭ mi la komitatanoj tro malmulte pensis pri la internacieco de nia movado.



John Wells, maldekstre, novelektita prezidanto de UEA, interparolas kun la kongresa sekretario Nikola Rasić kaj la respondeculo pri informado de la kongresa komitato, Ian Fantom.



*Sinjoro So el Koreo, estas nova estrarano de UEA.*

En ĉiuj elektoj oni pensas tro eŭropece, kaj tio eble malkuraĝigos la movadojn en ekz. Azio. Tio validas kaj por la estraraj kaj la C-komitatanaj elektoj. Tie ankoraŭ ne videblas, ke ni estas tutmonda movado.

### **Virina agado**

Sesdeko da personoj, la plejmulto virinoj, aŭskultis prelegon de reprezentantino por iu virina asocio, laŭ mia supozo la "Asocio por profesiaj virinoj". Ŝi ankaŭ ricevis informojn pri Esperanto kaj promesis pluinformi al siaj membro, kiajn komunikajn eblecojn donas nia lingvo.

Jes, la prelego estis iom interesa, sed multaj virinoj venis por informiĝi pri la pasintjara agado de la komisiono por virinaj aferoj kaj ties diversaj landaj reprezentantoj. Ankaŭ mi volis aŭdi pri tio kaj ankaŭ pri la planoj por venonta laboro. Sed nenio el tio okazis. La prezidantino, Elsbeth Bormann, tutsimple dankis la preleginton, fermis la kunsidon kaj diris: "Ĝis revido en Kubo venontjare!". Ŝi finis la kunsidon malgraŭ protestoj de Kimie Markarian, kiu helpis al Elsbeth aranĝi la prelegon kaj ankaŭ planis diskuton ĝeneralan inter la virinoj. Ĉar la komitato aŭ la estraro vere ne reelektis Elsbeth Bormann kiel komisiiton por virinaj aferoj, ni ankoraŭ ne scias, ĉu estos "revido" en Kubo aŭ ne.

### **Respondeculoj de landaj asocioj**

25 reprezentantoj el 22 landoj partoprenis kunsidon gvidatan de antaŭa estrarano Texier. Li disdonis broŝuron, kompilitan de li, kiu listigas realigojn kaj projektojn de pli ol 30 landoj, surbaze de iliaj propraj respondoj al lia dissendita enketo. Tio donis bildon de la nuna situacio en la landaj asocioj.

Estis raportoj pri kelkaj regionaj renkontiĝoj, i.a. raportis Laaksonen pri nia nordia regiono. Okazis similaj renkontiĝoj kaj en Azio kaj en Sudameriko. En la kunsido ni diskutis eblecojn helpi al la novaj kluboj en Afriko kaj Azio kaj en kia maniero plej bone helpi. Multaj kluboj en Eŭropo havas superfluaĵajn librojn kaj aliajn materialojn, kiujn oni povus donaci al iu klubo en lando, kie mankas libroj. Tri personoj prenis sur sin proponi manieron por realigi la interŝanĝon de ideoj kaj transsendon de libroj.

### **Tago de la Paco**

La ĵaŭdo estis nomita "Tago de la Paco". Sub gvido de Joŝimi Umeda kaj Michaela Lipari estis programo de la 10-a ĝis la 17-a, kun paŭzo por lunĉo. Antaŭtagmeze la temo estis "Esperanto kiel ilo de pripaca edukado". Diversaj personoj faris dekminutajn enkondukojn pri tiu temo kun postaj diskutoj. Estis personoj el Nederlando, Belgio, GDR, Hungario, Britio kaj Israelo, do tre diferencaj aspektoj estis debatitaj. Du sovetiaj artistoj kontribuis al la programo per kanto kaj muziko.

Oni povas nur bedaŭri, ke tiel malmulte da homoj trovis la vojon al la granda salono Zamenhof. Kvankam oni emfazas, ke paco estas nia plej grava temo, oni ne partoprenas la verajn pacarangojn. Kompreneble multaj aliaj aferoj konkurencis pri la intereso, sed oni tamen demandas al si, kion signifas paclaboro por la esperantistoj.

Ni decidis sendi telegramojn al "Moskvaj Novaĵoj", pro ilia decido eldoni sian gazeton ankaŭ en Esperanto-versio, kaj al la samtempe okazanta packonferenco en Hiroŝima.

### **Esperantistoj kaj ekologio**


"La roloj de esperantistoj en ekologiaj movadoj" – tio estis la titolo de la posttagmeza diskutemo. Pacagado kaj mediprotektado estas kunligitaj. Bona medio kaj socia justeco estas gravaj elementoj en la paclaboro. Ankaŭ pri tiu temo estis pluraj enkondukaj paroladoj, kaj ni ankaŭ vidis diablildserion pri la forhakado de la necesaj pluvarbaroj.

Ekzemple en Sovetio nun estas granda aktivado en diversaj ekologiaj rondoj, kaj ili serĉas kontaktojn kun same okupitaj grupoj en aliaj landoj. Oni opinias, ke Esperanto povos esti bona komunikilo en tiuj streboj.

Estis starigita nova ekologia asocio kun apogo de la plej multaj partoprenantoj en la kunsido, kaj ankaŭ de multaj diversaj Esperantoasocioj kaj -grupoj.

### **Monda Turismo**

En la kunsido, al kiu invitis la organizo "Monda Turismo" estis multtute da interesitoj. Ĉi tie la homoj ricevis raportojn pri sukcesaj kaj efektivaj agadoj. Ŝajne en tiuj agadoj, kie oni uzas Esperanton praktike, regas pli da optimismo ol en aliaj kampoj. Estis reprezentantoj de diversaj landaj turismo-organizaĵoj,



*Iwo Durwael gvidis kunsidon pri informado kaj prezentis praktikajn ideojn pri pli aktiva informado de UEA. Li eniris la estraron de UEA en la tago antaŭ ĉi tiu kunsido.*


# Infanoj kongresetis apud Brajtono

kiuj raportis pri sia laboro kaj siaj venontaj planoj. Turismo ankaŭ estonte estos grava parto de la Esperantomovado, kaj parto, per kiu oni tre facile povos atingi neesperantistojn.

## La kooperativa Esperantomovado

Alia movado, kiu praktike utiligas Esperanton estas la kooperativa movado. Ĝi ankoraŭ ne atingis samajn sukcesojn kiel Monda Turismo, sed tamen la rezultoj estas bonaj, se oni konsideras, ke temas pri tre nova agado.

En ilia kunsido ĉeestis reprezentantoj de sufiĉe multaj landoj. Ĉi-jare speciale interese estis, ke pluraj kooperativoj en Sovetio havas grandan intereson pri kunlaboro



*Sinjoro Magis Linnamägi el la estona urbo Tartu serĉis kontakton speciale kun estonoj en Svedio kaj kun esperantistoj el Upsalo, kiu estas ĝemelurbo de Tartu.*

kun kooperativanoj en aliaj landoj. Ankaŭ en tiu ĉi kunveno regis optimismo pri la eblecoj praktike uzi Esperanton en la ĉiutaga agado.

Jen la kongreso, kiel mi travivis ĝin – eble nur mankas la personaj kontaktoj, la amikaj renkontiĝoj, kiuj estas esenca parto de Esperantokongreso. Sen tiuj la Esperantomovado ne vivus. Kongreso estas "amikeci trans limoj".

**Märtha Andreasson**



*Infankongresanoj kantis kaj ludis por vizitantoj je la fino de la semajno. "La fluanta tajdo" estis tiel populara, ke fine la oreloj de la gvidantoj doloris je ĝi.*

La ĉi-jara infankongreso okazis en urbeto tuj apud Brighton, nome Rottingdean. Dank' al bonaj kontaktoj inter britaj esperantistoj kaj la loka lernejo, la infankongreso povis okazi en tre taŭga lernejo. Tiu lernejo estas konstruita por loĝigi knabojn je ĝuste tiuj aĝoj, kiujn havas la infankongresanoj. Ĝi havas belan korton, propran basenon por bani sin, grandan herbejon por ludoj, sportan halon, bonajn dormoĉambrojn por 5–10 litoj kaj taŭgajn klasĉambrojn. Kvin personoj el la ordinara stabo laboris pri manĝoj kaj purigado.

Partoprenis 33 infanoj je aĝoj 9 ĝis 12, kelkaj iomete pli junaj. Krom ili estis preskaŭ dek helpantoj je aĝoj ĝis 19-jaraj, kaj preskaŭ dek plenaĝaj gvidantoj. Tio signifas, ke ĉiu infano ricevis bonan prizorgon.

La organizadon faris Kristoforo Fettes, kiu loĝas en Irlando kaj laboras kiel instruisto. Li aktive varbis partoprenantojn kaj helpantojn, kaj organizis alsendon de multe da bona ludmaterialo. Ĉiutage la infanoj

havis horon da interesa laboro por fari marionetojn, aŭ ranojn el ovujo kaj balono. Ili multe kantis, ĉar du el la gvidantoj estas muzikistoj, kaj ili ofte banis sin en la apuda maro sub la superrigardo de tre sperta naĝisto. Ĉiutage oni filmis per videobendo, kaj montris la filmon al la infanoj en la vespero. El tiu materialo oni provos poste redakti informan videobendon pri la infankongreso.

Preskaŭ ĉiuj infanoj bone sciis Esperanton. Heleno Fantom, la loka organizantino, diris, ke necesas por infano havi sufiĉan pasivan komprenon de Esperanto, kaj ankaŭ iom da kuraĝo diri la plej necesajn vortojn pri manĝo kaj higieno, sed ne necesas esti flue parolanta esperantisto por partopreni infankongreson.

Parto el la infanoj havis gepatron aŭ gefraton inter la gvidantoj, kaj el la aliaj multaj havis parencon aŭ proksiman konaton inter la UK-anoj.

**Ulla Luin**

# Variaj prelegoj en la Kongresa Universitato

Kiel kutime IKU estis efektivigita en varia programo – eĉ se la nombro de la lekcionoj (naŭ) estis pli normala ol la ĉ. 20 dum la jubilea kongreso en Varsovio.

Kion vi diras pri la larĝeco de la temoj? Ingo Hofman (FRG): Transe de la atom-epoko, Erich-Dieter Krause (GDR): Ĉu Esperanto devas pliriĉigi sian vortrezoron?, Marjorie Boulton (Britio): Iris Murdoch, Bengt-Arne Wickström (Svedio): Merkato aŭ plano – kiel organizi la ekonomion?, Janko Štruc (Jugoslavio): Fortiĝanta rolo de merkato en jugoslavia ekonomio, Petr Chrdle (Ĉeĥoslovakio): Problemario de aŭtomatigo de la rangodeklivoj – teoriaj kaj praktikaj vidpunktoj, Lev Medvedev (Sovetunio): Ekologia kaj geokemia signifo de plantara sorbo kaj elimino de substancoj, Árpád Máthé (Hungario): Pri la centjara Esperanto-gazetaro, Povilas Jegorovas (Sovetunio): Litova Esperantomovado – historia skizo, nuna stato, perspektivoj. Sufiĉe bona, ĉu ne?

Eĉ se la faka enhavo estis altnivela kaj altinteresa – generale kaj speciale – en ĉiuj lekcionoj, la prezen-

tada metodiko tamen faris kelkajn pli publikafablaj ol la aliaj. La plej sukcesa el tiu vidpunkto estis la lekcio de Krause. Li vere havas la kapablon kapti la intereson! Kontraŭe, la interesa lekcio de Medvedev povus esti ankoraŭ pli interesa, se li turnus sin al la publiko kaj ne al la teksto sur la tabulo dum longa parto de sia lekcio. Bedaŭrinde la faka sperto ne ĉiam iras man-en-mane kun la prezentada metodiko – eĉ ne en la scienca mondo.

Marjorie Boulton estas daŭre sola kiel virina lekciisto. Si ĉiam estas aŭskultinda, vidinda kaj leginda. Sed ĉu fakte ne estas pli da virinaj kolegoj esperantistaj, kiuj povus partopreni kaj montri, ke ŝi ne estas tute sola?

Resume do estis larĝa programo kun pluraj altnivelaj kontribuoj, kiuj montras, ke la esperanta mondo havas plurajn eksterordinarajn fortojn en ĉi-tiu scienca regiono (Hofmann ekz. esperantigis antaŭ nur kvar jaroj!), eĉ se oni de temp' al tempo volus vidi pli bonan prezentadmetodikon.

Torsten Lund

## Ankaŭ la distraĵoj tre abundis

Certe ne ekzistas kongresoj, kiuj ebligas distraĵon multnacion en sama amplekso, kiel la Universalaj Kongresoj de Esperanto. La UEA-kongreso en Brighton ne estis escepto.

Dum la kongresa semajno ni i.a. povis vidi tri diversajn teatraĵojn. La unua kaj la plej ambicia estis la konata dramo "Kato sur varma landotegmento" de Tennessee Williams, brile prezentita de la germana grupo "Kia Koincido". La pola

aktorino Barbara Lukaszewska prezentis en moderna monologo kun lumbildoj la meditojn de "La eta princo", verkita de Antoine de Saint-Exupéry, kaj fine ni vidis "Kiel amas aliuloj", altkvalita brita komedio de la angla dramisto A. Ayckbourn kaj tradukita de W. Auld. La prezentinta brita grupo meritas grandan aplaŭdon, ĉar nur malofte estas videblaj amuzaj teatraĵoj dum la kongresoj.

La nacia vespero kiel kutime

montris pecojn de la kulturo de la gastiganta lando. Orĝenaj muzikaĵoj donis al ni konatajn tonojn de i.a. Henry Purcell kaj Jeremia Clark. Kantisto kaj kantistino unuope aŭ kune prezentis kantojn popolajn kaj operajn. Flutisto kaj klarinetisto ludis anglan muzikon kaj dancgrupo el sudorienta Anglio prezentis tre malnovajn popoldancojn kaj unu tute novan girlandan dancon. Grandan aplaŭdon donis al ili la publiko, kiam ili fine de glava danco pere de siaj glavoj kreis kvinpintan stelon.

Diversnaciaj artistoj prezentis la programerojn dum la internacia vespero. Inter ili ni volonte aŭskultis al Sara Su Jones el Usono, kiu violone ludis verkon de Mendelssohn, kaj vidis koreinon, kiu belege dancis popolan korean dancon. Ni ne forgesu la internacian koruson, tiun manifestacion de multnacia kunago, kies rezulto ĉiam estas grandioza. Ĝin gvidis Dimitr Terziev el Bulgarujo.

Al la distraĵoj kongresaj apartenas ankaŭ la koncerto, dum kiu diversnaciaj artistoj prezentis muzikaĵojn de diversaj tipoj, de Schubert ĝis novkomponitaj esperantaj kantoj.

La kongresa balo sekvinta la bankedon estis iom stranga. Registia mallumo en la ejo, ke oni preskaŭ ne povis rekoni homojn en la krepusko. Krome mankis al ni viva muziko.

Kompreneble multaj aliaj aranĝoj estas menciindaj, ekz. la interkona vespero, dum kiu la urbo Brighton regalis nin per koktelo.

La granda oferto de distraĵoj tamen malfaciligis la elekton kaj estis tute neeble sukcesi vidi aŭ aŭdi ĉion. Kaj tio verŝajne ankaŭ estis la intenco, por kontentigi ĉies guston!

Lisbet Andreasson  
Gertrud Lund

# Tago de la lernejo kaj internaciaj ekzamenoj

La Tago de la lernejo fakte nur estis duonposttagmezo de la lernejo. Pro diversaj mankoj, kiel elfalo de la programo en la kongresa libro kaj kolizio kun aliaj tre allogaj programeroj, la lerneja programo nur anigis proksimume 60 personojn. Krom tio la programo okazis en la plej granda salono de la kongresejo.

Enkonduke Stefan MacGill prezentis la temon "Motivado". Sekvis deko da petitaj intervenoj, plus demandoj kaj komentoj el la publiko. Oni aŭdis pri ŝanĝoj en la studprogramoj en Hungario, Britio kaj Francio. Precipe en Britio la reformoj starigis obstaklojn al la instruado de Esperanto, dum en

Hungario la maldeveno de la rusa lingvo malfermas perspektivojn.

El la vidpunkto de motivado, restas tamen nerespondita la demando, ĉu oficialigo de Esperanto en la lernejo estas nepre pozitivaĵo, kaj, se ne, kiel eviti ĝiajn malfavorajn aspektojn.

## Internaciaj ekzamenoj

La internaciaj ekzamenoj de UEA kaj ILEI estis proponataj je elementa kaj meza niveloj dum la kongreso. Naŭ kandidatoj submetiĝis al la novstilaj ekzamenoj, kvin je elementa kaj kvar je meza nivelo. Tri el ili estis svedoj.

Jus anoncita 36-paĝa libreto

klarigas la celojn, postulojn kaj regularon de la ekzamenoj. Krome ĝi prezentas du specimenajn ekzamentestojn, unu elementan kaj unu mezan, kiuj ebligas al interesatoj juĝi, ĉu ili havas la necesan nivelon. La libreto kostas 6,60 nederlandajn guldenojn kaj estas mendebla ĉe UEA aŭ ILEI.

Bertil Andreasson

## SEJU

Sveda Esperantista Junulara  
Unuiĝo  
Sveriges Esperantisters  
Ungdomsförbund

# Havanna 1990

Nu ĝas det bra att anmäla sig till den internationella esperantokongressen i Havanna 14-21 juli 1990. Om du anmäler dig före 31 december får du den lägsta kongressavgiften.

### Kongressavgiften i svenska kronor

	Till 31/12 1989	Till 31/3 1990	Fr o m 1/4 1990
1 Direkt medlem i UEA	575	720	865
2 Icke direkt medlem i UEA	720	865	1000
3 Medföljande/ handikappad eller ungdomar t o m 25 år som är direkta medlemmar i UEA	290	430	575
4 Medföljande/ handikappad eller ungdomar t o m 25 år som inte är direkta medlemmar i UEA	430	575	720

Beställ anmälningsblankett hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-501 52. Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29-5 Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

## Barn- och ungdomsträff i Närke i oktober

En träff för alla under 18 år ordnas 6-8 oktober i Östansjö utanför Hallsberg, där det finns en barngrupp som sedan länge läst Esperanto. På programmet kommer att finnas kurser på olika nivåer, lekar, sånger och kanske teater.

Lärare är bl a Sven Jonsson, van att undervisa barn och ungdomar. Lokalen är en skola med tillgång till kök. Vi sover på golvet i en gymnastiksal på madrass eller liggunderlägg samt sovsäck som var och en får ta med.

Färdbeskrivning skickar vi efter anmälan som görs genom inbetalning till SEJU:s postgiro 513301-2. Priser: SEJU-medlemmar under 21 år 150 kr, övriga 200 kr. (Barn och ungdomar blir automatiskt medlemmar i SEJU genom den högre avgiften.)

För närmare upplysningar ring: Camilla Persson, tel 011-153889, eller

Berit Posthuma, tel 0753-33928.



## Kurso por familioj

La 8-9 de aprilo estis kurso por familioj en la kursejo Idaröd. Partoprenis 12 infanoj kaj tri plenkreskuloj. La grupo laboris sub gvidado de Anna-Maria Lange.

La tradicia printempa kurso okazis en Gullbrannagården en kunlaboro kun la popola alternejo en Marakryd. 28 personoj partoprenis en tri grupoj.

## Nästan 100 program

Radio esperanto i Malmö närmar sig nu den hundrade sändningen efter nära två års arbete. Malmö esperantoklubb har stött närradio-sändningarna helhjärtat och utsett en kommitté med ordföranden Sten Svenonius och ytterligare tre-fyra medlemmar, som arbetat fram programmen och svarat för sändningarna. Ekonomin har klarats, delvis genom att vi bildat stödgruppen Radio Esperantos vänner, med en årsavgift på 40 kronor.

Kan verkligen amatörer sköta sådana här invecklade saker? Det har visat sig att så är fallet, må vara att bland amatörerna finns både ingenjörer och läroverksfolk. Det mesta beror dock på att det finns en verklig entusiasm för att varje vecka, utan någon som helst ersättning, offra fyra-fem timmar för att åstadkomma ett hörvärt program.


Vad är det då som vi har ansett viktigt att sända? Naturligtvis först och främst upplysning om vad Esperanto är, dess ideologi och historia och var man kan få veta mer om språket, dessutom upplysningar och kurser som skall starta och små kortkurser "Lär dig litet esperanto". Vi sänder också pressnytt från hela världens esperantopress.

Musiken är sång på esperanto

och svenska. Många olika esperantogrupper och-sångare finns med. Vi har ofta intervjuer med besökande gäster och särskilt har den polska radion uppmärksammat våra sändningar.

Nyligen har vi börjat med band-service. Vi erbjuder kvartalsprenumerationer på våra bandade sändningar. Vi hoppas att få många efterföljare och hälsar alla intresserade välkomna på studiebesök.

Lennart Magnusson  
Poppelgatan 61  
213 62 MALMÖ  
Tel 040-940920



Sten Svenonius mitt i sändningen från Radio Esperantos studio mitt i Malmö. Efter två års sändningar närmar man sig tillsitt hundrade program.

## Bra resultat

